

BRAZILA ESPERANTISTO

65-a Jaro

JANUARO-MARTO 1971

N.º 682-684

Oficiala organo de **Brazila Esperanto-Ligo**, Societo de publika utileco (dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921). Jarabono eksterlande: 15 respondkuponoj.

Sidejo: **Praça da República, 54, 2.º** — Telefono: 232-6309 — RIO DE JANEIRO — BRAZILIO
Respondeca redaktoro (redactor principal): **D-ro Carlos Domingues**

ARAGUAÍNA – GOIÁS



La verda flago flirtas super *Gimnazio Sankta Kruco*, kie Esperanto estas
konata amata kaj lernata.

KONVERSACIO (III)

TELEFONO

- Karlo, la telefono sonoras!
— Mi tuj respondos, patrino.



- Hola! 42-4350.
— Mi vo'as paroli al D-ro Paŭlo.
— Momenton, sinjoro.



- Patro, oni vokas vin per la telefono.
— Dankon, Karlo.



- Hola! Kiu parolas?
— Ĉi tie Alberto. Kiel vi fartas, Paŭlo?
— Ho! Ĉu vi, Alberto? kiam vi alvenis?
— Hieraŭ vespere. Mi vin vokis antaŭe, sed la telefono ne respondis.
— Ĉu vi diskumis la ĝustan numeron: kvar-du-kvar-tri-kvin-nulo?
— Tiun numeron mi ja vokis; mi konsultis la telefonlibron. Sed okazis erara interkomunikiĝo.
— Tamen ne mia aparato misfunkciis; difekto de la centralo aŭ de la dratoj.
— Ĉe nova provo aŭdiĝis la signalo de okupiteco, kaj mi tute ne sukcesis sonorigi al vi.
— Vere tre bedaŭrinde, ĉar mi ... (interrompo).

-
- Hola! hola! Oni tranĉis nian komunikon! Mi ne demetis la aŭdilon...
— Plej bone estos, se vi venos por manĝi kun mi, Alberto. Ni havas multon por interparoli.
— Ĉu mi ne ĝenos?
— Ho, ne! Vi estas malnova amiko de la familio. Mi atendos vin je la sesa.
— Do kun prezuro. Ĝis tiam!

G. P.

PLENA GRAMATIKO DE

ESPERANTO

Baldaŭ venos la 3-a volumo

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

Membro simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brasilista Esperantista"	15,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	40,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	60,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	90,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 10 vezes a quota deste.	
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 20 vezes a quota deste.	

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
Rio de Janeiro, GB

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ

Discursos e preleções do famoso orador Pro. Dr. Ivo Lapenna, presidente da U.E.A. e membro da Academia de Esperanto. Magnífico material para documentação, informação e argumentação Cr\$ 26,00

Para Curso Superior

	Cr\$
Fundamenta Kretomatio . . .	25,00
Plena Vortaro de Esperanto .	24,00
Esperanto sem Mestre . . .	16,00

NOVA TELEFON NUMERO

Atentu al la nova numero de la telefono de nia oficejo:

232-6309

PLENA ILUSTRITA VORTARO

Verko de 56 kunaŭtoroj sub ĝenerala gvidado de Gaston Waringhien. Eldonita de Sennacieca Asocio Tutmonda (Parizo) en Julio 1970. Tole bindita, $14,6 \times 20,2 \times 6,3$ cm. kun 1.344 paĝoj inkluzive de 30 bildplatoj. Prezo en la Libroservo de BEL: Cr\$ 180,00

Dank' al saĝa kaj plej vigla aktiveco de Lanti ekde la jaro 1927 Plena Vortaro de Esperanto estis kompilita de la kvaropo E. Grosjean-Maupin, G. Waringhien, E. Esselin kaj S. Grenkamp-Kornfeld kaj aperis en 1930, kiel firma bazo el klare difinitaj vortoj, konsilitaj kunmetaĵoj, uzpretaj dirmanieroj kreitaj de la rutino kaj metaforoj ĝenerale akcepteblaj, kun la celo fiksi la lingvon, normigi ĝian uzadon, tiel ke la evoluo kaj riĉiĝo de la vortprovizo okazu senkompromite por la unueco kaj stabileco de Esperanto.

La antaŭparolo al la reeldono de 1934, jam atinginta 7004 artikolojn, diris, ke ĝi espereble estos facile ekzamenita, esplorita kaj pridiskutita de la Lingvo-Komitatoj tiamaniere, ke, kiam estonte la Esperantista Akademio prenos sur sin la eldonon de Oficiala Plena Vortaro, la verko liveros solidan bazon, sur kiu la oficiala eldono povos stariĝi. Ĝi servos ne nur al tiuj, kiuj deziras ĝuste kompreni la esprimojn kaj nuancojn en la tekstoj, sed ankaŭ al tiuj, kiuj volas korekte kaj bonstile verki en la lingvo.

La tria eldono (1947) anoncis, ke G. Waringhien, la sola postvivanto el la kvar aŭtoroj, jam de longe ricevas el ĉiuj landoj amason da notoj kaj atentigoj de esperantistoj

plurajn jarojn uzintaj la verkon, por ĝin revizii kaj havigi al ni Plenan Ilustritan Vortaron: enciklopedieto kun ilustroj kaj parto pri propraj nomoj.

Ambaŭ promesoj de P.V. plenumigis: ĝi estis Biblio por la esperantistoj de nia generacio, kaj nun aperas, post pli ol 20 jaroj da intensa laborado, **PLENA ILUSTRITA VORTARO**, 'la plej monumenta verko en la historio de la Internacia Lingvo', kiel diris R. Rossetti. Kun fiero ni povas ĝin kompari al kiu ajn el la plej bonaj nacilingvaj vortaroj.

Same kiel — en gepatra lingvo — la vortaristoj konsideras la tradicion pri formo de la vortoj, ilia baza senco, derivaĵoj kaj kunmetaĵoj, konstruo de la frazoj, kaj esploras la literaturon kaj popolan uzadon pri dirmanieroj, stilo, metaforoj, ktp., la kunaŭtoroj de P.I.V. fidele observis la Fundamenton kaj zorge kompilis el la verkoj de niaj beletristoj.

Rezulte de tio la vortaro registris pli ol 15.250 kapvortojn, kies nombro altiĝas al multaj dekmiloj, se oni aldonas la derivaĵojn kaj kunmetaĵojn, detale difinitajn en la artikoloj. Fatoro por elekto estis la uzateco; nur kiam la komune akceptebla vorto aŭ formo ne estis klare konstatebla, la vortaro indikas sian preferon per antaŭmeto de la signo de egaleco al la konsilita:

KURATEL/O = kuratoreco.

En ĝi troviĝas la ĝusta, preciza redono por la plej nuancitaj esprimoj en gepatra lingvo, por ĉiuj lingvaĵoj kaj eĉ por vulgaraĵoj, kies registro en nacilingvaj vortaroj estas severe barata de la morala cenzuro.

Aperfeiçoe o seu conhecimento

... "Comecei, então, a evitar traduções literais, pensando diretamente na língua neutra. Daí por diante, senti que, em minhas mãos, ela deixava de ser mera sombra, sem base, dêste ou daquele idioma, com que eu lidava no momento; agora possuía espírito próprio, vida própria, fisionomia bem definida e claramente expressa, livre de quaisquer influências "

Zamenhof

Traduza o trecho abaixo e aguarde o número da revista, para confrontar seu trabalho com nossa tradução. Colha ensinamentos, estudando os pontos de divergência.

O DESTINO BATE A PORTA

Érico Veríssimo

Mas... para o diabo as reflexões filosóficas e amargas! Estava festejando o meu casamento.

— Vamos embora, Clarissa!

La difinoj estas majstre trafaj: RAV/I (tr). Sentigi entuziasman admiron, kvazaŭ forprenante la animon el la korpo.

SAŬDAD/O. Amara ĝuo de rememoroj k bedaŭroj, propra al portugaloj.

Sed estas tute maloportune kritike paroli pri la enhavo de P.I.V. Ĝi jam anstataŭis nian karmemoran Plenon Vortaron de Esperanto, kaj dum longa, longa tempo nepre plenumos ties gravan rolon. Ni nur ĉiam atentu la celon de la verko — la sama de P.V. — kaj memoru, ke vortaro konsilas, ne devigas.

Esperantisto deziranta altnivele paroli kaj skribi en la Lingvo Internacia ne povas malhavi Plenon Ilustritan Vortaron.

Um garôto descalço e esfarrapado dorme estendido em cima dum banco ao lado do pequeno quiosque, onde se alugam barcos e bicicletas. Tomo duma cédula de dez mil réis, dobro-a e ponho cuidadosamente no bolso do garôto, sem despertá-lo.

— Quando êle acordar... que surpresa!

— Vai ser lindo! — exclama Clarissa. — Quando eu era menina sempre tive desejos assim... Abrir os olhos e ver nos pés da cama o presente com que eu sonhava.

— Eu também... Meter a mão no bolso e encontrar uma prata de dois mil réis...

— Como é bom o milagre, não é mesmo?

Enlaço-lhe a cintura e digo baixinho:

— Isto é um milagre. O dia calmo, nós dois casados, juntos, livres...

De repente Clarissa tem um estremecimento, afasta-se de mim, segura-me ambos os braços com força.

— Vasco! Tive uma idéia. Vamos andar de bicicleta!

Como única resposta, puxo-a pela mão e precipitamo-nos para o quiosque. Dentro de alguns minutos estamos a pedalar ao redor do lago.

— Faz meses que não ando nisto! — grita Clarissa.

— E eu ... anos!

— A nossa viagem de núpcias!

Seus cabelos esvoaçam ao vento e ela tem no rosto um resplendor de felicidade. Aos poucos vou sentindo a volúpia da velocidade e em breve é como se as rodas da bicicleta não tivessem mais contato com o chão.

— Princesa do Figo Bichado! — grito. — Mais depressa!

— Vamos embora, Gato do Mato!

Começamos a gritar como selvagens. Árvores, moitas, gentes, cercas, bancos, casas, cachorros, flores e veículos — tudo rodopia. Fazemos a primeira volta. Pedalamos desesperadamente. É um momento vertiginoso e grave.

LA NOBLA KORANO

Texto paralelo em árabe e em Esperanto Cr\$ 84,00

G. P.

DU NOVAJ STRATOJ

JUIZ DE FORA — MG

Per la lêgo n-ro 3.392 de la 12-a de Februaro 1970 la Komunuma Ĉambro aprobis kaj la Urbestro sankciis rezolucion, kiu donas la nomon "Esperanto" al strato de urbo Juiz de Fora.

Ni transskribas la tekston de tiu lêgo en la nacia lingvo:

Lei N.º 3.392 — de 12 de fevereiro de 1970.

Dispe sôbre denominação de logradouro público.

A Câmara Municipal de Juiz de Fora aprova e eu sanciono a seguinte lei:

Art. 1.º — Passa a denominar-se "Rua Esperanto" a atual rua "A", do Vale dos Bandeirantes.

Art. 2.º — Revogadas as disposições em contrário, esta lei entrará em vigor na data de sua publicação.

Paço da Prefeitura Municipal de Juiz de Fora, 12 de fevereiro de 1970.

Itamar Augusto C. Franco,
Prefeito Municipal

Vera Maria Ladeira Rocha,
Resp. P/Exp. da Div. de Administração

Estu menciante, ke de 1953 jam ekzistis en la sama urbo strato kun la nomo "D-ro Zamenhof".

SÃO CARLOS — SP

La Urbestro de urbo São Carlos en Stato São Paulo, publikigis la dekreton n-ro 6.381 de la 24-a de Februaro 1970, kiu donas la nomon D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof al strato en tiu urbo.

Jen la teksto, en portugala lingvo, de tiu dekreto:

Decreto N.º 6.381 de 24 de Fevereiro de 1970

O Prefeito Municipal de São Carlos, no uso das atribuições que a lei lhe confere:

DANKON, PATRO MIA

Elvira Fontes

*Lasis vi la teron, kie
Estis via vivo amara
Certe vi ĝojigis tie,
Mia bona patro kara.*

*Mi ne scias ĉu min aŭdas
Tie vi en mondo alia:
Tre sincere mi vin laŭdas,
Patro bona kara mia,*

*Pro al hejmo la sindediĉo
Kaj pro via forto ŝtona
Ĉe kruela malfeliĉo,
Mia kara patro bona.*

*Sed precipe estos mi
Por ciam al vi dankema
Pro la ekzemploj de vi-
Honesta patro, verema-*

*Donitaj dum vivo via
Malfacila, peniga.
Pro la konduto fieriga
Mi vin dankas, patro mia!*

Decreta:

Art. 1.º — Fica denominada "Dr. Luís Lázaro Zamenhof", criador da língua internacional Esperanto (1859—1917), a rua do Parque Estância Suíça, que inicia na Avenida Marginal e termina na pista transversal do Aeroporto Salgado Filho, sendo a primeira paralela à rodovia Washington Luiz, a partir desta, de conformidade com o que consta do processo protocolado sob n.º 1890/68.

Art. 2.º — Este decreto entrará em vigor na data de sua publicação, revogadas as disposições em contrário.

São Carlos, 24 de fevereiro de 1970.

José Bento Carlos Amaral
Prefeito Municipal

Registrado na Diretoria Administrativa e publicado.

Enio Mariano
Diretor Administrativo

BRAZILA KRONIKO

BAHIA

Salvador — En la 3-a de Oktobro lasta, kun la ĉeesto de malnovaj kaj novaj esperantistoj, Bahia E-Asocio realigis en la aŭlo de sia sidejo kunveno por omaĝi Profesoron Nelson de Souza Oliveira maljunan kaj malnovan samideanon kaj ankaŭ por disdono de diplomoj de B.E.L. al gelnintoj. Parolis Kap. Godofredo de Araujo Goes, la prez. de B.E.A. D-ro José Siquara da Rocha kaj Prof. Oliveira. Sur la teraso de la sidejo oni regalis per dolĉaĵoj la ĝojan ĉeestantaron.

SÃO PAULO

Ribeirão Preto — La 21-an de Novembro de la pasinta jaro Ribeirão Preto Esperanto-Klubo elektis la estraron por la jaro 1971. Prezidanto estas nia samideano S-ro Manoel Moacir Siscatti.

São João da Boa Vista — La prezidanto de la Komunuma Ĉambro, D-ro Maurício José de Azevedo Oliveira, komunikis al B.E.L., ke laŭ propono de la urbkonsilanto D-ro Jatir Gonçalves Vieira estis aprobita en la 3-a de Aŭgusto de la pasinta jaro gratulesprimopro la dato de la apero de la unua Esperanto-Libro.

RIO GRANDE DO SUL

Cachoeira do Sul — Nia samideano S-ro Armindo Trarbach diligente diskonigas Esperanton en sia urbo, precipe ĉe la rotaria medio, kiel oni legas en "Rotary Club de Cachoeira do Sul", faka periodaĵo.

GOIÁS

Araguaina — Skribas al B.E.L. nia kara samideano Prof. Frato Macario Piastrella: "La verda flago de la Espero flirtas en la ĉielo de Araguaina la ekonomia ĉefurbo de la ekstrema nordo de Goiás. Ĝi estas suprentirita sur la masto de Gimnazio Sankta Kruco de tiu urbo, memorigante en la jaro 1969 pli unu jaron de la naskiĝo de la granda apostolo de la unuigo de la popoloj, la kreinto de Esperanto, D-ro Zamenhof.

NEKROLOGO

PEDRO REAL

Nia samideano Prof. Pedro Real naskiĝis en Aachen, Germanujo, la 11-an de Junio 1903 kaj post longa malsano mortis la 10-an de Julio de la pasinta jaro en Paranavaí, ŝtato Paraná. Li finis siajn studojn en la Universitato de Königsberg.

Li alvenis al Brazilo en 1936 kaj al Paranavaí en 1956. En tiu urbo li estis profesoro kaj direktoro de la ŝtata Kolegio; li estis fondinto kaj direktoro de Gimnazio de Alto Paraná; profesoro de matematiko, desegno, fiziko, kemio, filozofio, statistiko, Latina, Franca, Angla, Germana, Greka, Hebrea, Hispana, Itala, Rusa lingvoj kaj Esperanto. Li havis pli da 30 jaroj da Latineco.

Li gvidis plurajn kursojn de Esperanto inter aliaj en la urboj União da Vitória, Alto Paraná, Tamboara kaj Paranavaí, kie en 1956 li malfermis kurson kun pli ol 40 lernantoj. Prof. Real estis Delegito de U.E.A. kaj Fakdelegito pri edukado, kontraŭ-alkoholismo kaj katolikismo. Li fondis Sanktan Kristoforon Esperantan Grupon kaj poste Paranavaí Esperanto-Klubon. Havante la Supran Diplomon, li estis faranta la Profesoran Kurson, kiun la morto interrompis.

Elstare li partoprenis en la 3-a Esperantista Eŭkaristia Mondkunveno okazinta en la kadro de la 36-a Internacia Eŭkaristia Kongreso en Rio de Janeiro, en 1956.

Eksterordinara klera homo, Prof. Pedro Real dediĉis al Esperanto tutan sian entuziasmon kaj kapablon. Ni sincere kondolencas lian familion.

DE ZAMENHOF
ORIGINALA VERKARO

Prefácios, artigos, tratados, discursos, cartas, poesias — coligidos e ordenados pelo Dr. J. Dettlerle.
Enc. Cr\$ 39,00

En la lernanta medio de Araguaina, Esperanto estas konata, amata kaj lernata!"

DIPLOMOJ

1970

Faris ekzamenon kaj ricevis diplomon
jenaj esperantistoj:

NORMA ELEMENTA DIPLOMO

*Associação Baiana de Esperanto,
Salvador:*

Marysses Bomfim de Aragão
Suzete Maria Fonseca Dias
Maria da Conceição Cerqueira Leal
Yolanda Criaes Souto Maior
Aydê Martins Barreto
Edson Guimarães Pedra

*Brazila Klubo Esperanto, Rio de
Janeiro:*

Luís Carlos Franco
Sônia Falcão Franco
Edson de Faria Gomes
Raymundo Acreano Gomes
Sylvio Malheiros
Almir Carrosini Paulo
Ivan Cardim da Silva
Neusa Cardim da Silva
Raymundo Souza
Solange Maria Nesti de Souza

*Associação Paulista de Esperanto,
São Paulo:*

Elvira Fontes
Eliete Bernardinelli
Elísio Rosa da Bandeira Ramos
Elisabete Marcello
Eliza de Camargo
Eneida Gonzalez
Erika Mella Csukassy
Fany Dupré
Geraldo Rodrigues Socira
Ilse Erna Jalowski
Joaquim Soares de Oliveira
Lindaura de Barros Lima
Maria Aparecida Manreza Gewehr

Maria Valderez Silva César
Myrtes Pereira Farneze
Ruy Farneze
Sebastião de Paula Sobrinho
Valdemir Moreira
Walkiria Vernacci

*Norda Princino Esperanto-Klubo
(Oficiala Kurso de Urbestrejo), Pinda-
monhangaba, SP:*

Martha Nogueira da Silva
Francisco Santiago Neto
Zenaide Marcondes
Regeline de Moura
Sandra Maria Raimundo
Guilherme Schmidt Filho
Wilson Valentini Junior
Wilson Valentini
Maria do Carmo Godoy
Luzia Célia Schmidt
Ilze Carvalho
Maria Aparecida Schmidt
Zeno Salgado Palma
Ailton Barbosa Figueira
José Carlos Pereira dos Reis
Luciana Monteiro
Joaquim dos Santos
Maria Aparecida Ribeiro
Rosa Lia Vendramini

*Associação Brasileira de Esperan-
to, Brasília:*

Wilma Princivalli de Almeida Campos
Doralice Menandro Whately
Sinval Sampaio Landin
Sílvia Corrêa de Faria
Maria Cândida Silveira
José Ernesto Gasparotti
Florismar Lima de Jesus
Elizeth Vitoriano Gomes
Regina Rodrigues de Guimarães
Humberto Andrade Nogueira
Flávio Magalhães Lima
Urivaldo Almeida de Amorim
Mariléa Mota Jadão

Per korespondado:

Edemur Morales, Bauru, SP
José Leal Ferreira, Salvador
Claudio Fernandes Leal, Resplendor,
MG
Ely Martinez Cunha, Bagé, RS
Mauricio Fernandes de Castro, Viçosa,
MG
Miguel de Arruda Câmara, Recife
Antônio Domingos Sobrinho, Catende,
PE

BRAZILA ESPERANTISTO VOJAĜAS

Komisiite de Petrobrás S.A., kie li
estas ingeniero, la 1-a Sekretario de
B.E.L., D-ro Floriano Pessoa, veturis
al Mekisiko kaj Usono en studvojaĝo.

Sendube li uzos la okazon por vizi-
ti esperantistajn rondojn en tiuj landoj.

NORMA SUPERA DIPLOMO

*Norda Princino Esperanto-Klubo,
Pindamonhangaba, SP:*

Luiz Molinari

*Ribeirão Preto Esperanto-Klubo, Ri-
beirão Preto, SP:*

José Pedro Miranda
Dirce Alfayer Soutelinho

*Esperantista Societo de Rio Gran-
de, Rio Grande, RS:*

Dirceu Porciúncula
Thusnelda Reinhardt Halfen
Ivone Franco Nunes
Ione Franco Nunes

Per korespondado:

Manoel Blaz Garcia, Sorocaba, SP
Adolpho Marreiro Júnior, São Vicente
SP
Denizard Silveira, São Paulo

NORMA PROFESORA DIPLOMO

*Ce Universidade Federal do Ceará
pere de Ceará Esperanto-Asocio, Forta-
leza:*

Antonio Soares de Alcantara
Francisco de Assis Caetano
Mires Braga Meireles Cardoso

*Norda Princino Esperanto-Klubo,
Pindamonhangaba, SP:*

Waldomiro Benedito de Abreu

Per korespondado:

Carlos Prates Castanho, São Paulo
Godofredo de Araujo Goes, Salvador

Cont. de E. no Estrangeiro

ROMÊNIA — Durante a Páscoa na Basílica de Bucarest foi lido o Evangelho em várias linguas, inclusive o Esperanto. Pessoas presentes que, pela primeira vez ouviam a lingua, encantaram-se com a sonoridade do Esperanto e se informaram de como aprendê-lo.

ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

ALEMANHA — O filme documentário "A Alemanha em 20 Anos", em nova cópia sincronizada em Esperanto, está sendo ultimado para empréstimo a organizações esperantistas que o desejarem. Trata-se de um trabalho de grande importância informativo-didática.

BÉLGICA — Todas as segundas-feiras, em Antuérpia, o instrumentista Jo Haazen, delegado de música da U.E.A. dá um concerto de carrilhão, organizado pelo Conselho Municipal. A Lira de Antuérpia acaba de editar um prospecto informativo dos concertos em Esperanto e flamengo.

BULGÁRIA — A "Balkanturist", agência turística oficial, organizou na cidade de Sófia um "Repouso entre amigos esperantistas" a que compareceu grande número de adeptos. O encontro proporcionou aos participantes um "repouso" de 12 dias.

ESPANHA — O "Centro de Esperanto Sabadell" organizou um programa de intercâmbio que possibilita que esperantistas estrangeiros permaneçam algumas semanas em Barcelona, hospedando-se em casas de famílias esperantistas. A única condição é que o hóspede fale fluentemente o Esperanto. Informações no clube: Apartado 407, Sabadell (Barcelona).

ESTADOS UNIDOS — O Colégio Estadual de San Francisco e a União de Estudo de Línguas Estrangeiras estão organizando um seminário esperantista móvel. Sob a direção de William Auld, da Escócia, e Richard L. Trapp, do Colégio de San Francisco, o seminário será realizado em Londres, no âmbito do Congresso Universal, em Edimburgo, no Congresso Internacional da Juventude, e no famoso Castelo Gréssillon, na França.

Na Universidade de Dayton foi realizada uma série de conferências de universitários que falam Esperanto. O Departamento Histórico da Universidade subvencionou o ciclo de palestras organizado por Richard Wood, Louisiana State University, Baton Rouge, Louisiana 70803.